

Heinrich Heine,
 [Ne scias mi, kio okazis]
tradukita de Paul Gottfried Christaller

El la "Libro de la kantoj", parto "La Reveno".

Ne scias mi, kio okazis
 al mia tristema kor':
 Antikva legendo min kaptis,
 ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile
 murmuras kiel mister',
 la supron ŝonegan orumas
 sunbriloj de la vesper'.

Plej bela virgino jen sidas
 mirinda sur la montet'
 kaj ŝia oraĵo radias,⁴
 ŝi logas kiel magnet'.

Ŝi kombas la oran hararon
 abundan per ora kombil',
 kantante misteran lidon,⁵
 ravantan kiel sunbril'.

...

Heinrich Heine,
 Lorelejo
tradukita de Joachim Gießner

Malgajon mi sentas en koro,
 sed kial tia tim'?
 Legendo el pratempa foro
 Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,
 kaj malvarmetas l' aer'.
 Sed brilas la mont' en orbelo
 pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas
 per ora juvelar',
 kaj ŝia beleco allogas
 kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,
 sirene kantas ŝi
 per neimagebla, mirige
 potenca melodi'.

...

Heinrich Heine,
 The Lorelei
tradukita de Mark Twain

An ancient legend of the Rhine

I cannot divine what it meaneth,
 This haunting nameless pain:
 A tale of the bygone ages
 Keeps brooding through my brain:

The faint air cools in the gloaming,
 And peaceful flows the Rhine,
 The thirsty summits are drinking
 The sunset's flooding wine;

The loveliest maiden is sitting
 High-throned in yon blue air,
 Her golden jewels are shining,
 She combs her golden hair;

She combs with comb that is golden,
 And sings a weird refrain
 That steeps in a deadly enchantment
 The listener's ravished brain:

...

⁴En la sube menciiita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia". Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

⁵En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

Ŝipisto en sia ŝipeto
kaptiĝas per stranga dolor',
la rifon li tute ignoras.
atentas nur ŝin kun fervor'.

Mi kredas: la ondoj englutas⁶
ŝipiston, ŝipeton je l' fin',
kaj kulpa pri tio nur estas
kantado de la virin'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (*1860-08-21 – †1950-12-31).*

Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: "Buch der Lieder", Abschnit "Die Heimkehr". - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la wikipedia retejo http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller, kun foto de li.

Ŝipiston en eta boato
Turmentas koremoci'.
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,
rigardas nur supren al ŝi!

Gis tiras kun si al Rejn-fundo
la ondoj lin kun boat'.
Nun kuŝas li en la profundo
pro Loreleja kantad'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorf-str. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.

The doomed in his drifting shallop,
Is tranced with the sad sweet tone,
He sees not the yawning breakers,
He sees but the maid alone:

The pitiless billwos engulf him!-
So perish sailor and bark;
And this, with her baleful singing,
Is the Lorelei's gruesome work.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de Mark Twain.*

Arg-2-11 (2003-10-13 04:42:59)

A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880 (rf. <http://www.loreley.com/loreley/marctwai.htm>)

⁶Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.